

## **ILEI regione en Beogrado, 2024/08/17-24**

Post la ekscita ILEI-kongreso en Maceio, Brazilo, 2024/07/20-27, kun sufiĉa tempa kaj geografia distanco, vi povos partopreni kunvenon de esperantistaj instruistoj el Balkanio kaj malsupra Danubio, kaj ĉiuj aliaj interesatoj, okazontan en Beograd, Serbio, inter la 17a kaj 24a de aŭgusto 2024.

Se vi ŝatas:

- Renkonti malnovajn kaj novjn geamikojn
- Kunumi en amika interkultura etoso de Esperantujo
- Lerni inkluzivecon en la ĉiutaga vivo kaj en edukado
- Trejniĝi pri interkultura komunikado kaj kompetento, projektmastrumado kaj subvencipetado
- Diskuti komunajn problemojn kaj iniciati komunajn projektojn
- Ekkoni Serbion kaj ĝian ĉefurbon
- Ĝui esperantistan belartan programon

spacon por ĉio ĉi kaj multe pli proponas la evento "Interkulture kaj inkluzive" en Beograd, Serbio, inter la 17a kaj 24a de aŭgusto 2024, kun kombinitaj programoj por via elekto:

- 88a IKBE (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj)
- IKK-seminario de SEL/UEA: Trejnseminario pri interkultura komunikado kaj kompetento, instrukapabligo kaj aktivula lertigo. Instruos Duncan Chartes, Francesco Maurelli, Sara Spano kaj aliaj fakuloj pri la seminaĵaj temoj.
- Tagoj de ILEI: regiona renkontiĝo de instruistoj kaj ILEI-anoj de Balkanio kaj malsupra Danubio
- Balkanaj tagoj: kunveno de esperantistoj el Balkanaj kaj najbaraj landoj

La eventon gastigos la Lernejo por lernantoj kun difektita vidkapablo en Zemun (parto de Beograd proksima al la flughaveno), Serbio. La vasta bele ordigita korto, aranĝita por senobstakla moviĝo de blinduloj, proponas agrablan spacon por promenoj, kunumado kaj babilrondoj meze de la urbo tamen for de la urba bruoj. La tutsemajna kotizo de 270 EUR inkluzivas:

- ĝuon de la programo inkluzive de ekskurso

- loĝadon en komfortaj trilitaj ĉambroj organizitaj en triĉambraj loĝblokoj kun komunaj tagĉambro, du duŝejoj kaj du necesejoj
- Tri manĝojn ĉiutage
- Unutagan ekskurson.

Se vi deziras loĝi kaj manĝi aliloke, vi pagos nur la bazan kotizon de 50 EUR kaj povos trovi ĉambron en proksimaj hoteloj aŭ gastejoj traserĉeblaj rete.

Bonvolu aliĝi per la [elektronika aliĝilo](#).

Vi povas peti stipendion laŭ la jena [stipendikonkurso](#) kaj per la jena [stipendipetilo](#).

Bonvenige salutas vin  
Organiza Kongresa komitato